

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI


SEPTEMBRO 1998

N-ro 3 (86)

Esperanto-Muzik-Magazino

ROK- gazeto

E
U
R
O
K
K
A



Artikolo
sur paĝo 4

Jaro 1997

Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la piej oftajn 1237 vorfradikojn. Tiu ĉi vortar'eto: **Esperanto, Minimum szótár** aperis en 1995, kaj estas aĉetebla ĉe la libro-servo de UEA kaj HEA.

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko(-) troviĝas inter la elementoj de vortkun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'igi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel akzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto re-venas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino ...) ni ne uzas kromsignojn.

Vi ofte trovas kornojn (.) . Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regufaro de la gusta skribo



Sur la titol'paĝo:

**Lapona
knab'eto
kun sia hundo,
Norvegio**

Jen plen'kolora

preso kaj luksa, brila papero por la kovrilo. Tiel aspektos **"Juna Amiko"** ek-de 1999. Per tio komenc'ig'os nova etapo¹ en nia historio. Esper'eble la nova vesto plus kvar al-donaj paĝoj al-tiros novajn abonantojn. Por ni estus aparta ĝojo, se vi helpus nin dis-kon'ig'ante la revuon inter viaj amikoj kaj kon'atoj.

Tiu-cele vi trovas en la nuna numero de la revuo fald'folion. Ĝi servas kiel varb'ilo² por la sekva kalendara jaro. Kiel vi vidas, ni devas iom alt'igi la abon'prezon. Ni faras tion ne por gajni profiton³, sed por kovri la efektivajn pres- kaj poŝt'kostojn, kiuj en Hungario ĉiu-jare salte alt'ig'as pro inflacio⁴ ĉirkaŭ 20 %-a.

Krom la bela ekstera aspekto mi havas ankaŭ alian kialon por ĝoji. Ŝajnas al mi, ke iom post iom, fin'fine, ni povos el-iri el la Eŭropo-centra rondo. Aktiv'ig'as, feliĉe, pluraj junaj samideanoj en Afriko, al-ig'is sperta profesoro el Irano, volonte helpos en la redakt'ado⁵ instruisto de infanoj el Kubo. Nia redakt'ist'aro baldaŭ fariĝos, do, vere tut'monda. Pro tio mi ĝojas sen-fine, ĉar ne sufiĉas nomi la revuon inter-nacia, necesas ĝin efektive fari tia. Kaj nun ni havas veran esperon atingi la celon pri kio ni ĉiuj de-longe sopiras⁶.

Geza Kurucz
redaktoro

1. tempo-parto / 2. varbi: al-tiri, konvinki homojn / 3. mon'gajn'ajo / 4. prez'alt'ig'o / 5. redakti: verki artikolojn, fari gazeton / 6. forte deziras.

Gratulon al EUROKKA, kiu ek-estis antaŭ 10 jaroj, en 1988. Post tri jaroj ĝi far'igis fak'asocio de TEJO³.

De 1990 EUROKKA el-donas bel'aspektan revuon *"ROK-gazet"*, kiu regule informas pri freŝaj nov'ajoj de la Esperanta muzikkulturo. Ĝi prezentas pop-, rok-, folk- kaj jaz'grupojn, kiuj kantas ankaŭ en la Lingvo Internacia. De kelkaj jaroj la nombro de tiaj muzik'grupoj kreskas.

En la jaro 1990 EUROKKA star'igis disk'el-don'ejon VINILKOSMO. Ĝi celas dis-kon'igi bandojn kaj personojn, kiuj kantas en Esperanto. Vi trovas la fotojn de pluraj ĝiaj kasedoj kaj KD (:kompakt'diskoj).

KOLEKTO 2000

Okaze de la 10-jariĝo de EUROKKA en la kadro de *Kampanjo 2000* VINILKOSMO lanĉas⁴ la projekton⁵ *Kolekto 2000*. Temas pri kompakt'diska kolekto, kiu startis en tiu ĉi printempo kaj daŭros ĝis


2000 aŭ 2002. Dum ĉi tiuj jaroj ĝi volas aper'igi serion de minimume dek 6/8-titolaj KD-oj el diversaj E-art'istoj, la unua el ili *"Jo-Mo"* jam aperis.

EUROKKA / VINILKOSMO invitas la E-artistojn partopreni kaj la esperantistojn sub-teni la projekton abon'ante por *Kolekto 2000*.

Por pliaj informoj, klar'igoj kaj kun mendoj turnu vin al EUROKKA
FR-31450
Donneville
Francio
(Tel/Faks:
+33 5
61 81 95 65)

Kon'ataj bandoj:

*Kajto,
Persone,
La Mond'anoj,
Esperanto,
Amplifiki,
Afrika Espero,
La Mevo.*



1. moderna muzika stilo, ĝenro / 2. organiz'ajo / 3. Tut'monda Junul'ara Esperant'ista Organiz'ajo / 4. komencas ion gravan, ekzemple el-doni serion de diskoj / 5. plano evektiv'ig'inda.



Por sana homa korpo necesas diversaj nutraĵoj. Tion ni scias nun multe pli detale¹ ol antaŭ 50 jaroj dank' al internaciaj sciencaj esploroj. Tamen, por akiri ĉiujn dezir'atajn substancojn², ĉu necesas aĉeti manĝ'ajojn, kiuj bezonas arte-far'itan sterkon³, aŭ kiuj venas el malproksimaj landoj, kaj sekve bezonas poluciigan⁴ trans-port'adon? Se ne, kia-maniere niaj pragepatroj nutris sin sane? Ĉu hodiaŭ ni ne povus fari simile?

Laŭ mia opinio, niaj pragepatroj instruis nin kresk'igi fruktojn kaj legomojn nature⁵, tial mi proponas⁶, ke ni postulu tiajn produktojn, eĉ se unue ili havos nek la saman grand'econ nek sen-makulan aspekton. Pri manĝ'ajoj, produkt'itaj en fora loko, eble ekster-lande, ni ek-sciu, ĉu ili estas neces'ajoj aŭ dezir'ataj nur pro reklamoj kaj nun-tempa al-kutim'ig'ado?

Karaj leg'antoj, mi proponas al vi jenon:

Elektu ŝat'atan manĝ'ajon aĉet'itan en vend'ejo kaj esploru ties vojaĝon aŭ tiun de la en-hav'ajoj ek-de la komenco de ties produkta procedo. Rakontu ĝian historion kaj vojaĝojn kaj donu vian opinion pri ĝia valoro por via sano. Ĉu ĝi estas anstataŭ-ig'ebla kaj ĉu ĝi ankorau estas necesajo aŭ nur for-ig'ebla luks'ajo?

PER NIA NUTR'ADO NI PROTEKTU LA TERON!

Jennifer BISHOP (Aŭstralio)

1. detalo: malgrava part'eto / 2. materio, kiu konsist'igas ion / 3. nutraĵo por tero, kampo / 4. mal-pur'igan por la medio / 5. sen al-dono de fremdaj substancoj, kem'ajoj / 6. donas sekv'inda(j)n konsilo(j)n.

En tiu ĉi numero, sur diversaj paĝoj, vi trovas **polan humuron**. Jen la unua:

Sinjoro Kowalski sidas ĉe okul'kuracisto antaŭ tabulo kun la surskribo WZKYMTCUH.

„Do, ĉu vi povas legi tion?” demandas la kuracisto.

„Tion mi povas, kompren'eble, sed ĉu vi ne havas ion en la pola lingvo?”



Claude Piron (=Klod Piron), sviso, estis traduk'isto ĉe UN¹ kaj poste fariĝis psikologo². Li laboris por Monda Organizo pri Sano, inter-alie en Azio kaj Afriko. Li instruis en la psikologia fakto de Ĝeneva Universitato³ de 1973 ĝis 1994. Sub la nomo *Johán Valano*, li publik'igis romanon *Tien* kaj kvar detektiv'romanojn⁴, plus poem'aron⁵. Sub la propra nomo li verkis *La bona lingvo* kaj plurajn roman'etojn aŭ rakont'arojn en facila Esperanto.

ESPERANTO SIGNIFAS POR MI ...

Kiam, 9-jara, mi hazarde⁶ vidis paper'eton, kie la samaj klar'igoj estis pres'itaj en dek du lingvoj, mi ne imagis, ke pro ĝi mia vivo iĝos tute alia ol ĝi estus sen ĝi. Super ĉiu teksto troviĝis la nomo de la lingvo, sed unu el tiuj nomoj estis al mi stranga, ĉar ĝi ne similis al nomo de popolo: Esperanto. Kio tio estas? Mi serĉis en vort'aro. Post tri linioj pri la est'igo kaj celo de la lingvo, venis ekzemploj pri la vort'fin'aĵoj. Ili entuziasm'igis min: la sistemo estis tre simpla, kompare kun mia gepatra lingvo! Mi decidis lerni tiun lingvon. Sed kiel? Ĉirkaŭ mi neniu sciis, kiel fari.

Nur post tri jaroj, kiam amiko trovis kurson de ĝi en malnova kolekto de por-knaba revuo, mi povis ek-lerni. Mi rapide progresis. Ankaŭ unu el miaj fratoj lernis Esperanton kaj ĝi fariĝis nia sekreta lingvo. Kiam mi ek-studis aliajn lingvojn, mi miris pri la mal-facil'eco esprimi en ili plej simplajn aferojn, kiujn ni sen-probleme vort'igis en nia sekreta komunik'ilo.

Kaj jen mi vidis informon pri junul'ara Esperanto-asocio⁷. Per ĝi mi ek-sciis, ke la lingvo ĉie havas uz'antojn. Mi komencis korespondi kun ĉina sam'aĝ'ulo, poste kun japana, brazila kaj aliaj. Estis ekster-ordinare!

Tiu sperto fort'igis mian intereson pri lingvoj, kaj mi lernis ilin pli facile ol la sam'klas'anoj, ver'ŝajne pro la kompreno pri gramatiko, kiun Esperanto hav'igis al mi. Kiam mi estis 25-jara, mi ricevis traduk'postenon⁸ en UN. Kiel aĉe funkciis tie la lingva komunik'ado, kompare kun la uzo de Esperanto! Japano, kiu studis la anglan dum dek jaroj, ne povis rekte komuniki kun italo, kiu dum ses jaroj studis la francan! Kaj ili ambaŭ trovis sin en serioza mal-avantaĝo⁹ rilate al uson'ano, kiu ne devis lerni iun ajn fremdan lingvon!

Sed neniam decid'pov'ulo prenis min serioze, kiam mi provis atent'igi pri la objektiva pli-bon'eco de Esperanto. Tiel mi al-venis al mia dua profesio: mi studis psikologion por provi kompreni, kial homoj preferas kom-


plikan sistemon, mon'voran¹⁰, malbone funkci'antan al io glata, malmultekosta kaj multe pli demokratia.

Labor'ante por tut'mondaj organiz'aĵoj, mi multe vojaĝis. Ĉie Esperanto montr'iĝis utila. Mi ĉie penetris la lokan vivon en maniero, pri kiu la kolegoj¹¹ ĵaluzis¹². En mia vivo mi ofte devis paroli angle, sed en tiu lingvo mi neniam sentas min natura, kaj neniam mi staros egal'nivele kun angla-lingv'ano, tion mi iom post iom komprenis. En Esperanto, similaj sentoj neniam prezent'iĝas. Tial ĝi estas por mi io tre alt'valora. Ĝi signifas respekton al ĉiu homo el kiu ajn kulturo. Ĝi signifas sanan prudenton: kial provi inter-kompren'iĝi per multekosta, tempo-raba, mal-egal'iga sistemo, dum ekzistas io, kio dek-oble pli bone funkcias ĉe dekoble malpli granda temp-, pen- kaj mon'investo? Krome, Esperanto ege plaĉas al mi per sia luda aspekto: oni povas krei amuzajn vortojn, kiajn ne eblas ali'lingve, kiel "ŝi estas kis'inda", "kial vi onklas al mi?" aŭ "mi pretas kolekti kaj kokteli la respondojn". Ĝi estas lingvo liber'iga por la kreemo, poezie¹³ tre bela kaj, laŭ mia sperto, pli favor'anta ridon ol iu ajn alia. Jes, mi ŝuldas multon al ĝi. Ĝi bel'iĝis mian vivon en neesprim'ebla mezuro.

Claude Piron, majo 1998

1. Unu-iĝ'intaj Nacioj / 2. specialisto pri spiritaĵoj / 3. supera lernejo / 4. detektivo: kaŝ'polic'isto / 5. poemo: vers'aro / 6. ne-intence / 7. grava organiz'aĵo / 8. labor'lokon / 9. mal-antaŭ-eco, mal-privilegio / 10. vori: beste manĝi / 11. kun-labor'uloj / 12. sentis fortan deziron havi la sorton de alia homo / 13. poezio: arto de vers-far'ado.

Ludmila Jevsejeva



Zoo-studo¹

Supre kaj malsupre — plado²,
tute ronda kiel rado,
laŭ sabla voj' mov'iĝas,
kap', piedoj vid'ebliĝas.
Tute simpla zoo-studo,
temas, knaboj, pri ...?

— Testudo³!

1. zoo(logio): scienco pri bestoj / 2. granda manĝo-vazo / 3. mal-rapid'ega besteto kun forta kiraso sur la dorso kaj la ventro.

Tra jar'centoj dek-miloj da sen-kulpaj homoj, plej-parte virinoj, estis ekzekut'itaj², post torturoj³, kiel sorĉistoj. Inter la kaŭzoj estis superstiĉo⁴, eklezia⁵ totalismo kaj envio⁶.

Malgraŭ tio, ke jam ĉ. (ĉirkaŭ) 900 p.K. (post Kristo) kleraj homoj asertis⁷, ke aferoj de sorĉistoj estas malsaĝ'ajoj, fantazioj⁸, tamen ĉ. 200 mil homoj estis ekzekutitaj sub ekleziaj inkvizicioj⁹. Kaj ne opiniu, ke tio okazis nur antaŭ jarcentoj (j.c), en la "brula epoko" (14-18a j.c), tute ne. Ekster-leĝaj mort'igoj okazis eĉ en la 20-a jarcento, ekzemple en Svislando, en la jaro 1966 fanatika¹⁰ religia grup'eto decidis, ke knabino estas "nov'edzino de la diablo"¹¹ kaj bat'mortigis ŝin.

Tamen, la plej ŝoka¹² aspekto de la "brula epoko" estis, ke la vasta pli-multo de la ekzekutitoj ne estis sorĉistoj aŭ sorĉistinoj, sed homoj, kiuj konfesis ne-far'itajn krimojn sub premo de ekstremaj¹³ torturoj.

Interesa aspekto de tiu terura historio estas la kredo, ke dom'besto ĉe sorĉistino certe estas sorĉ'besto kun specialaj postuloj kaj potencoj.

Ĝenerala ideo estis, ke kiam la sorĉistino faris kontrakton¹⁴ kun Satano¹¹, tiu ĉi provizis ŝin per demona¹⁵ help'anto, mask'ita¹⁶ kiel, ŝajne, ordinara besto. Ŝi devis nutri tiun beston, kutime per sia sango, kiun ĝi suĉis el speciala sorĉistina cico¹⁷, kiu povis troviĝi ie ajn sur la korpo. Inter la unuaj esploroj de la arest'itoj¹⁸ troviĝis nud'igo, plena tra-serĉ'ado por tiu speciala cico. Kaj ĝi ne bezonis tre simili al normala mam'pinto, sufiĉis ia el-kresk'aj'eto, veruko¹⁹, makulo, ktp. kaj kiu el ni ne havas tian, precipe en maljuna aĝo?

Iu ajn besto povis fariĝi sorĉbesto; eĉ araneo, muŝo, abelo²⁰. Se besto vizitis sorĉistinon en ĉelo²¹ aŭ tortur'ĉambro, kompreneble, ĝi estis ŝia sorĉbesto, kiu venis por konsoli aŭ konsili ŝin. Sed plejparte oni akuzis²² pri ia dombesto, kiu vivis iom kamarad'ece kun la sorĉistino. La plej ofte suspekt'itaj²³ estis katoj kaj bufoj²⁰. Aliaj sorĉbestoj, laŭ diversaj dokumentoj, estis strigoj, ranoj, hundoj, musoj, kaproj, leporoj, kunikloj, vespertoj, pigoj, k.a. (kaj aliaj). La sorĉistino rajdis sian beston al sabat'orgioj²⁴ kaj sendis ĝin ien

kaj ŜIA KATO

por trans-doni ian mal-benon, detruu ion. Io tia troviĝas en multaj aliaj kulturoj, ekzemple: hindaj, indiaj, malaja, pacifikaj kaj afrikaj.

Speciala popular'eco de katoj kiel sorĉbestoj havis plurajn kaŭzojn. Ili estas bestoj, kiujn izol'itoj²⁵ ofte amas. Ilia mieno²⁶ sugestas²⁷ ion fieran, ion misteran²⁸, ian posedon de sekretoj, ian enigm'econ. Ek-de la 12-a jc ekzistis rakontoj pri Satano, kiu aperis kiel nigra kato. Oni akuzis herez'ulojn²⁹ en Francio en la 13-a jc, ĉar ili adoris³⁰ Satanon en formo de nigra kato kaj rite³¹ kisitis ĝin sub la vosto.

Tiu longa tradicio pri katoj eble de-venis de antikva³² Egiptio, kie oni adoris katojn kaj la simpatian kat'kapan diinon Bast, diinon de ĝojo, danc'ado, muziko, amoro³³ kaj kie oni funebris³⁴ kaj mumiiĝis³⁵ siajn katojn kiel famili'anojn. Sed la egipta sin-teno estis pozitiva. Krist'anoj diabl'igis la diojn de fremda religio.

La longa, sanga historio pri sorĉistinoj kaj sorĉbestoj estas tragika³⁶ ekzemplo de kelkaj homaj inklinoj³⁷: histerio, obsedo, total'ismo, kruel'eco kaj mal-just'eco, kaj tiuj inklinoj ne malaperis post grandaj progresoj.

El prelego (1996) de Marjorie BOULTON (Britio)



1. sorĉi: fari ion mal-bonan helpe de mal-bona spirito / 2. mort'igitaj post decido de juĝistaro / 3. dolor'igaj procedoj / 4. mis-kredo / 5. ekzisto: krist'ana societo / 6. deziro havi ion de al'uloj / 7. firme esprimis sian opinion ke io estas vera / 8. fantazio: krea imag'povo / 9. eklezia juĝistaro kiu brul'mort'igis sorĉistinojn kaj herez'ulojn / 10. blinde entuziasma, fervora / 11. mal-ĉiel'ano / 12. tre ĝena, ĉagrena / 13. tre kruelaj tortoj / 14. inter-konsenton pri io / 15. diable malbona / 16. masko: arte-farita vizaĝo / 17. mampinto, el kiu suĉ'infano suĉ'as lakton / 18. aretil: kapti iun por trans-doni al juĝisto / 19. el-kreskaĵo de haŭto / 20. serĉu la besto-nomojn en vortaro / 21. mal-vasta, malgranda ĉambreto / 22. dins iun kulpa / 23. suspekto: sen-pruvo opinio iun kulpa / 24. sen-bridaj amuzigo / 25. viv'antaj solaj sen kun-uloj / 26. vizaĝ'aspekto / 27. tru-de ven'igis ideon / 28. sekreto-plenan / 29. homojn, kiuj havas kontrarian religian opinion / 30. respektas kiel dion / 31. laŭ difinitaj reguloj / 32. pra-tempa / 33. korpa amo / 34. senti doloron pro morto de amito / 35. konservi la korpon de mortinto / 36. tre mal'ĝoja / 37. emoj

NODO¹ ĉe


Jen estas malgranda kaj sprita² artificio³ per naz'tuko.

Vi tenas la naztukon je la angulo kaj fiksas la atenton de la spekt'antoj⁴ al la pend'anta angulo. Poste, vi alt'igas ĉi tiun angulon kaj subite skuas⁵ ĝin. Post du aŭ tri provoj aperas nodo ĉe la angulo (vidu la ilustr'ajon).

SOLVO:

La nodo jam de-komence ekzistis ĉe la naztuko, sed la aliaj scias pri tio nenion krom la artifik'isto mem. Ĝi estas nod-ita ĉe tiu angulo, kiun vi tenas en la mano kaj tiel ĝi estas kaŝ'ita antaŭ la spektantoj.

Unue, la libera mano levas la sennodan angulon al la alia



angulo

mano, kiu tenas la nodon kaj skuas la pendantan angulon por est'igi nodon.

Post du tiaj movoj la manoj ne-rimark'eble inter-ŝanĝas la angulojn kaj, poste, kiam vi skuas la naztukon, aperas la nodo en la pendanta angulo.

Kompreneble, oni povas prezenti la artifikon multe pli sprite, babil'ante ion gajan sam-tempe.

*El PLANTETO, iama por-
infana gazeto, 1968*

1. lig'ajo / 2. tre plaĉa pro trafa surprizo / 3. ŝajna ruz'ajo / 4. homoj kiuj rigardas programon / 5. subite movas tien reen.

Grigor VITEZ

La luno

“Ho, avo, diru, ja kiu pravas?
Kiom da lunoj ni vere havas?
Jen unu ĉielon ornamas¹,
La dua rivere sin banas.”

Tradukis: *Vojnić Blaško*

1. pli-bel'igas.

La plej antikva² skribo-sistemo³, uz'ata de Persoj estis la kojno-skribo⁴. Ĉirkaŭ la 6-a jc. (jar'cento) a.K. (antaŭ Kristo), oni pli-bon'igis ĝin kre'ante specialajn signojn por transskribi kelkajn konsonantojn⁵ kaj vokalojn⁶ laŭ alfabeto formo.

La Iran'anoj (=Persoj) tuj adoptis⁹ la araban grafikon¹⁰, kies de-veno ne estas bone kon'ata. La rapida al-preno okazis nepre pro **Korano** (sankta libro de la islam'anoj).

La araba alfabeto havas 28 literojn. Por plej bone transskribi kelkajn sonojn, kiuj ne ekzistas en la araba lingvo, sed troviĝas en la persa, la Iran'anoj aldonis kvar literojn, sekve la persa alfabeto konsistas el 32 literoj, inter kiuj kelkaj havas la saman prononcon¹¹. La persan alfabeton vi trovas laŭ-orde sur la paĝo 13.

LA PERSA ALFABETO

De post la islama konkero⁷ (la 7-a jc. p.K.), la araba lingvo influis⁸ la persan, kun kiu ĝi havis, antaŭe, neniun komunan aspekton.

Kelkaj rimarkoj pri la persa skribosistemo

- ① En la persa, oni skribas de dekstra flanko al maldekstra.
- ② En la persa, kontraŭe al la eŭropaj lingvoj, ekzistas nek majuskloj¹², nek minuskloj¹³, sed la formoj: aparta, komenca, meza kaj fina.
- ③ Krom sep literoj (n-roj 1, 10, 11, 12, 13, 14, 30), la ceteraj kun-iĝas inter si meze de vorto.
- ④ Kelkaj literoj havas nur en la persa (kaj ne en la araba) la saman prononcon (n-roj 5, 15, 17 = s; 4, 19 = t; 11, 13, 18, 20 = z; 8, 31 = h; 22, 24 = q). Do, tiu-kaze oni devas atenti pri ortografio¹⁴.
- ⑤ Kvar literoj (n-roj 3, 7, 14, 26) apartenas al la persa alfabeto kaj ne troviĝas en la araba.
- ⑥ Ok literoj (n-roj 5, 8, 17, 18, 19, 20, 21, 24) uz'iĝas mal-ofte kaj aperas precipe en vortoj, kiuj havas araban originon¹⁵.
- ⑦ En la ordinara persa skribo, oni ne kutimas meti strek'etojn supre aŭ sube de konsonantoj por signi la mallongajn vokalojn.
- ⑧ Estas atent'inde, ke kelkaj persaj literoj havas ĉiam, laŭ-okaze, unu, du aŭ tri punktojn supre aŭ sube.

Vokaloj prezent'igas per streketoj supre aŭ sube de la konsonantoj aŭ per apartaj literoj:

Mallongaj vokaloj: <math>\begin{matrix} \text{اَ، اِ} & (a) \\ \text{اُ، اِ} & (e) \\ \text{اُ، اِ} & (o) \end{matrix}> Longaj vokaloj: <math>\begin{matrix} \text{آ، آ} & (a) \\ \text{ای، ی، ی} & (i) \\ \text{او، و} & (u) \end{matrix}>

⑨ Tri literoj (n-roj 21, 22, 24) signas sonojn, kiuj ekzistas nek en Esperanto, nek en la eŭropaj lingvoj.

⑩ Por skribi perse, la Irananoj uzas tri skribo-formojn: a) Tipografia skribo – Naŝh ; b) Litografia skribo – Nast'aliq ; c) Kursiva skribo – Ŝekasteh. En tiu ĉi artikolo mi prezentis nur la ordinaran skribosformon Naŝh.

Numeraloj. En la persa, kiel en la eŭropaj lingvoj, la numeraloj skribiĝas de maldekstre dekstren.

latina formo	persa formo	persa ortografio	E-prononco	latina formo	persa formo	persa ortografio	E-prononco
0	۰	صفر	sefr	10	۱۰	دِه	dah
1	۱	یک	jek	11	۱۱	یازده	jazdah
2	۲	دو	do	20	۲۰	بیست	bist
3	۳	سه	se	30	۳۰	سی	si
4	۴	چهار	ĉahar	40	۴۰	چهل	ĉehel
5	۵	پنج	pangĝ	50	۵۰	پنجاه	pangĝah
6	۶	شش	ŝeŝ	60	۶۰	شصت	ŝast
7	۷	هفت	haft	70	۷۰	هفتاد	haftad
8	۸	هشت	haŝt	80	۸۰	هشتاد	haŝtad
9	۹	نه	noh	90	۹۰	نود	navad

Ekzemploj:

A) VORTOJ

Esperanto	esperanto	اسپرانتو	libro	ketab	کتاب
Eŭropo	orupa	اروپا	patro	pedar	پدر
Irano	iran	ایران	patrino	madar	مادر
Hungario	maĝarestan	مجارستان	varma	garm	گرم
Varsovio	varŝo	ورشو	ĉevalo	asb	اسب

Kun-igaj formoj			Aparta formo	E- prononco	nomo de la litero	n-ro
fine	meze	komence				
—	—	—	ا	a	alef	1
پ	پ	پ	ب	b	be	2
پ	پ	پ	پ	p	pe	3
ت	ت	ت	ت	t	te	4
س	س	س	س	s	se	5
ج	ج	ج	ج	ĝ	ĝim	6
چ	چ	چ	چ	ĉ	ĉe	7
ح	ح	ح	ح	h	he	8
خ	خ	خ	خ	ĥ	ĥe	9
د	—	—	د	d	dal	10
ذ	—	—	ذ	z	zal	11
ر	—	—	ر	r	re	12
ز	—	—	ز	z	ze	13
ژ	—	—	ژ	ĵ	ĵe	14
س	س	س	س	s	sin	15
ش	ش	ش	ش	ŝ	ŝin	16
س	ط	ط	س	s	sad	17
س	ظ	ظ	س	z	zad	18
ط	ط	ط	ط	t	ta	19
ظ	ظ	ظ	ظ	z	za	20
ع	ع	ع	ع	'	'ejn	21
غ	غ	غ	غ	(q)	qejn	22
ف	ف	ف	ف	f	fe	23
ق	ق	ق	ق	(q)	qaf	24
ک	ک	ک	ک	k	kaf	25
گ	گ	گ	گ	g	gaf	26
ل	ل	ل	ل	l	lam	27
م	م	م	م	m	mim	28
ن	ن	ن	ن	n	nun	29
و	—	—	و	v	vav	30
ه	ه	ه	ه	h	he	31
ی	ی	ی	ی	j	je	32

B) FRAZOJ

zaban-e farsi besjar sade ast.

La lingvo persa tre facila estas.

man to-ra dust-daram.

Mi vi-n amas.

u ba baradaraŝ be alman raft.

Li/ŝi kun sia frato al Germanio iris.

— زبـان فـارسی بسیار ساده است .

— مـن تـورا دوست دارم .

— او با برادرش به آلمان رفت .

— آرمین دُر سال ۱۹۹۸ به دنیا آمد .

armin dar sal-e hezar-o nohsad-o navad-o haŝt be donja amad.

Armin en la jaro mil naŭ-cent naŭ-dek ok naskiĝis.

— اگر شما دوست دارید فارسی بدانید ، به آدرسن من نامه بنویسید .

agar ŝoma dust-darid farsi bedanid, be adres-e man name benevisid.

Se vi ŝatas la persan lerni, al adreso mia leteron skribu.

محمد جواد کمالی

Mohammad-Ĝavad KAMALI

IR-91375/5133 MAŜHAD, Irano

1. alfabeto: aboco / 2. mal-nov'ega / 3. sen-manka aro da signoj / 4. pinto-havaj signoj en-tranĉ'eblaj / 5. b, c, ĉ, d ... / 6. a, e, i, o, u / 7. milit'akiro / 8. vid'eble efikis / 9. prenis al si por ĉiam / 10. ĉi tie: liter'aron / 11. el-parolon / 12. grand-literoj / 13. efliteroj / 14. regularo pri tio kiel skribi la vortojn / 15. devenon.

Raporto pri infan'kongres'eto

Jen mallonga informo pri la infan'kongreseto, kiu okazis dum la 53-a SAT-amik'ara Kongreso en Saint-Brieuc de la 11-a ĝis la 13-a de aprilo.

La aranĝon partoprenis 18 infanoj, plej-parte 10-13-jaraj. Ekceptan karakteron donis al ĝi la fakto, ke kvin geknaboj ĉeestis ĝin el Bosnio. Ili lernis Esperanton nur dum kelkaj semajnoj, kiam Nicole RIZZONI vizitis kaj invitis ilin. Dum tri tagoj ili kun-vivis kun francaj infanoj, el kiuj ankaŭ multaj apenaŭ lernis Esperanton, tri konis eĉ ne unu vorton. La sukceso de tiu kun-vivo ne estis do evidenta. Sed, post tri tagoj, mi povas atesti pri ties sukceso. Plej malgranda kono de la lingvo ebl'igis sufiĉe bonan komunik'adon kaj est'igis ligojn. Tiuj geknaboj francaj kaj bosniaj neniam forgesos la tri tagojn kaj Esperanton.

La veter'aĉo ne povis mal-hef'igi nian ĉielon kaj ni ne havis tempon por enui. Ni pas'igis la tempon per spur'ludo, kantoj, bretonaj dancoj, kolor'igo de paskaj ovoĵ. Ni sendis komunan leteron al la franca prezidento, Jacques CHIRAC kaj dissendis poŝtkartojn al 20 infan'grupoj en la mondo.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis kaj ebl'igis akiri ne-forges'eblajn tra-viv'ajojn.

Manjo CLOPEAU, Francio


Riĉ'igu vian vort'aron!

En la decembra numero ni aper'igis vortojn, kiuj de-venas el la radiko *vid-*, kaj petis niajn leg'antojn sendi similajn al nia adreso.

Fine de majo ni ricevis dikan leteron el Kigoma, Tanzanio. Sam'ide'ano Michel Nkwirikiye, rifuĝ'into¹ el Burundio sendis al ni 947 vortojn, kiujn li konstruis per 32 radikoj. Koran dankon. Li ricevis jar'abonon por nia revuo. Ni prezentas el lia kolekt'ajo la vortojn per *labor-*. Ĉi-foje ni ne metas ilin en frazojn. Tio estos via tasko. La plej bonaj solvoj (sendu ilin al la redaktoro², adreso sur la paĝo 22) ricevos libro-donacon.

labor o	labor en-spezoj	mal labor ema
labor aĵo	labor evit'ulo	ne labor pova
labor ejo	labor forto	per labor i
labor ema	labor kampo	pri labor i
labor estro	labor kapabla	sam labor ulo
labor igi	labor loko	sen labor ulo
labor ilo	labor partio	sen labor eco
labor isto	labor per-ejo	tra labor i
labor ist'aro	labor plano	tro labor i
labor ulo	labor tago	tro labor igi
labor ĉambro	labor taŭga	pro labor a
labor daŭro	el labor i	trud labor o
labor don'anto	kun labor i	mal labor i

1. for-kuris por sin savi / 2. homo kiu faras gazeton.



Sinjoro Kowalski en-iras la ban'ĉambron kaj vidas, ke lia edz'ino lavas tri infanojn. Li diras:

“Sed ni ja havas nur du in-fanojn.”

La edzino: “Kaj kia-maniere ek-sciĝi, kiu estas la nia?”

11-13-jara geknaboj deziras korespondi tut'monde. Skribu al ilia instruisto: Prof. José de J. Campos Pacheco, calle 10 % 29 y 31 # 2708, piso 3 apt F-6, P. Bet. Matanzas, Kubo-42700.

Legendo¹ pri la floro «ne-forgesu-min-o»

Oni rakontas, ke post la apero de flor'germoj², kiuj komencis kreski, Feino de la Floroj baptis³ ĉiujn per aparta distinga⁴ nomo, nur pri unu-sola ŝi forgesis.

La floroj, kiuj ricevis nomon, estis tre kontentaj kaj gajaj, nur la sen-noma estis trista⁵ kaj meditema⁶ en valo apud river'eto. Ŝia vizaĝo estis plen'vers'ita de larmoj pro daŭra plor'ado.

Post kelka tempo, promenante en flor'plena verda kampo, Feino de la Floroj vidis ke la floroj estas tre gajaj kaj ĝojaj. Ankaŭ ŝi ĝojis, do, pri ili.

Dum ŝia promeno, iom mal-proksime, apud la rivereto, ŝi ek-vidis floron, kiu, per ploro, montris amaran doloron. La Feino demandis al ŝi mir-plena:

“Kial vi staras ĉi tie kaj ploras, kial vi ne ĝuas la gaj'econ kiel viaj fratinoj?”

“Kiel mi ne ploras kaj ne estus malgaja, se vi donis nomon al ĉiuj floroj, sole pri mi vi forgesis?” respondis ĝem'ante la flor'eto.

Aŭd'ante tian respondon, la Feino sentis kor'tuŝon pro la mal-feliĉo de la floreto. Ŝi komencis karesi⁸ kaj milde diris al ŝi:

“Ĉesu plori, mia kara, ne plu mal-ĝoju, ĉar baldaŭ ankaŭ vi havos nomon.”

Dirinte tion, la Feino re-iris al la palaco⁹, kie ŝi inter-konsil'iĝis kun la aliaj feinoj kaj, poste, vokis al si la floreton kaj diris:

“Vi ne forgesis min, kiam mi ne baptis vin kiel la aliajn fratinojn. Ek-de nun via nomo estu, do, «ne-forgesu-mino».”

De tiam, en multaj partoj de la mondo, la bela floreto kun bluaj petaloj¹⁰ nom'iĝas *ne-forgesu-mino*.

Laŭ “Popularaj rumanaj legendoj”
Tradukis: Eugenia-Ecaterina POPOVICIU

La oka azeno

(Popola rakonto el Norda Afriko)

Foje vivis viro, kiu havis sep azenojn. Iu-tage li volis vendi ilin. Antaŭ ol iri al la foiro¹, li kun-pelis la bestojn kaj nombris ilin. Kun kontento li vidis, ke estas sep azenoj.

Sur unu el la azenoj li metis selon², sid'iĝis sur ĝi kaj pelis la ceterajn antaŭ si al la foiro. Kiam li al-venis, li denove nombris la azenojn: "Unu, du, tri, kvar, kvin, ses. Ho! Ĉu mi mis-nombris? Mi devas nombri ankoraŭ-foje. Unu, du, tri, kvar, kvin, ses." Sed vane, kiom ajn da fojoj li nombris, li ĉiam vidis nur ses azenojn. Li decidis, do, re-rajdi hejmen kaj peti sian edzinon nombri la azenojn.

Kiam li atingis sian hejmon, li tuj vokis al ŝi: "He, edzino, mi petas, nombri la azenojn! Mi ĉiam trovas nur ses. Sed hodiaŭ matene estis ankoraŭ sep azenoj." La edzino laŭte ek-ridis. "Ĉirkaŭ vi estas vere nur ses", ŝi diris, "sed sur la sepa vi sidas kaj la oka estas vi mem. Ni ne perdis azenon, male, nun ni havas unu azenon pli! Venu vesper'manĝi, vi, saĝ'ulo!"



Tradukis Dieter BERNDT,
Germanio

1. granda dis-vendo de bestoj kaj produktoj, kiu okazas plej ofte unu fojon jare / 2. sur-besta sid'ilo por rajd'anto.

1. mirrakonto / 2. tre junaj plant'idoj / 3. doni al iu nomon / 4. diferenc'iga / 5. mal-gaja / 6. mediti: en-pens'iĝi / 7. mal-dolĉan / 8. mal-forte tuŝi kaj tiri la manon plur'foje / 9. bela dom'ego / 10. flor'folioj.



AGO-TAGOJ

En februaro 1996 okazis la unua AGO-TAGO por infanoj. Oni povis legi pri la projekto¹ en *Juna Amiko* 95/3 p. (paĝo) 7, 95/4 p. 7 kaj en *Eventoj* (1/januario 1996, p. 7).

En februaro 1996 du aŭ pli da grupoj de infanoj el diversaj landoj, por saluti internacian amik'econ, kantis nian internacian kanton "Sur la Tero". La grupoj informis lokajn ĵurnal'istojn pri la okaz'aĵo.

En 1997 kaj 1998 okazis la dua kaj tria AGO-TAGOJ por infanoj. Por festi internacian amikecon, grupoj de infanoj (ofte kun plen'kresk'uloj) kantis nian kanton en iu tago dum la monatoj de februaro ĝis junio, faris ekspozicion², parolis pri leter'amikoj el aliaj landoj.

Per helpo de esperantistoj, ni esperas, ke **AGO-TAGO por INFANOJ fariĝos ĉiu-jara okazaĵo** en multaj landoj. Jam nun komencu vin prepari al la sekva, 1999-jara AGO-TAGO (ĉiam la lasta plena semajno de februaro!).

Ni esperas ke nia projekto floros! **Kune, ni kaj la infanoj vekos la mondon!** (Ne forgesu informi la prezid'anton, kiu vin el-kore salutas kaj kies adresojn vi trovas ĉi-sube. Serĉu ŝin per viaj leteroj aŭ ret'mesaĝoj!)

Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo, *s-ino Charlotte Kohrs*,
3876 Belmont Ave., San Diego, CA 92116, U.S.A.

Retpoŝto: ckohrs@compuserve.com

En la apudaj kolonoj vi trovas la landojn (1-a), la urbojn (2-a) kaj la nomojn de la instruistoj (3-a), kiuj partoprenis en iu AGO-TAGO en la jaroj 1996, 1997, 1998. Kelkaj el ili partoprenis en ĉiuj tri AGO-TAGOJ. **Sekvu ilian ekzemplon!**

1. plano, decido pri aranĝo de aferoj / 2. ekspozicii: el-meti al publika vido.

Instruistoj, kurs'gvidantoj!

Ne forgesu, ke kun la nova lerno-jaro, re-komenc'igis la internacia poento-kolekta konkurso honore al I. Szerdahelyi por lernantoj kaj plen'ag'uloj. Por informoj serĉu la redaktoron. Adreso sur paĝo 22. Preferu la ret'adreson, se eblas.

Aŭstralio

Belgio
Benino
Brazilo

Britio
Ĉeĥio
Ĉinio

Francio

Germanio
Hungario
Japanio

Kanado

Kolombio
Kroatio
Kubo
Latvio
Litovio

Nederlando
Pollando
Rusio

Svedio
Tanzanio
Usono

Uzbekio

POR INFANCI

Hawthorn, Viktorio
Ipswich, Queensid
Oostende
Lokossa
Anapolis
Goiana
Felikstowe
Ĉeska Tribona
Chengdu
Beijing
Gargas
Limeyrat
Biesenthalo
Budapesto
Kyoto
Nagoya
Upper Rawdon
Kamloops
Cali
Zagreb
Havano
Ĉesis
Kaunas
Vilnius
Heemskerck
Ruda Sl.
Ijevsk
Nijnevartovsk
Murmansk
Tyresö
Bunda
Edwardsville, Illinois
Ft. Stockton, Texas
Geneva, Ohio
Houston, Texas
Indianola, Iowa
Lansing, Kansas
Madison, Wisconsin
Memphis, Texas
Middlebury, Vermont
Milwaukee, Wisconsin
Princeton, Minnesota
Royal Oak, Texas
Sheboygan, Wisconsin
Tempe, Arizona
Waynesboro, Pennsylv.
Westhampton, Mass.
Taškent

Jennifer Bishop
Karakan Kohardy
Raymond Wylleman
Gaston Houssou
Sidney Brasiko
Dilma C. Bandeira
Angela Tellier
Zdenka Novodna
Sichuan Cai Shouzhi
Shen, Chengru
s-ino Gibez
D. Ballesta
Bergit Feibig
Kornelia Nagy
Joel Brozovsky
Takezaki Mucuko
N.S.Kim Keeble
Anne Neave
Prof. Rafael Mejia O.
Marija Belošević
Olga L.M.Durato
Liga Bercé
Ruta Ĉepinskaite
Brone Aūkštikalniene
Ton Verwoerd
Aurelia Sokol
Bronoslav Ĉupin
T. Shuvaev
Aleksis Masiukas
Boomee Kim-Lindblom
D. Mramba Simba
D-ro Ronald Glossop
Mary K. Mills
Sharon Griffiths
Lorraine Bouchard
Darlene Evans, Jan Olds
Kathy Ray
Phyllis Hasbrouck
Darlene Archer
Martha Moseley
Thomas Kloecker
Constance Reinhard
Peggy Hardgrave
Thomas Gerlman
Angelina Taremi
Nicholas Wyborski
Sally Lawton
Eugene S. Perevertajlo



“Mi ne scias, sinjoro Kowalski” diris la kurac'isto kaj for-metis la stetoskopon¹. “Aŭ mi malbone aŭdas, aŭ vi jam estas mortinta.”



Ge-sinjoroj Kowalski sidas en kaf'ejo. Ĉe la apuda tablo sidas sinjoro, kiu fikse rigardas al ili.

La edzino: “Rigardu, tiu sinjoro ankoraŭ ne de-tur-nis siajn okulojn de mi.”

Sinjoro Kowalski:

“Stult'ul'ino. Tiu estas Malinowski, al kiu mi ŝuldas mil zlotojn².”



“Malinowski jam de-nove estas en malliber'ejo.”

“De kio vi scias tion?”

“Kiam mi demandis lian edzinon, kiam do li re-ven-os hejmen, ŝi rigardis la kalendaron.”



1. ilo por aŭskulte esplori la korpon
2. zloto: mono en Pollando.



kursgvidantoj

Duan fojon pri la flagoj



Ĉu vi jam provis uzi informojn pri flagoj kaj blazonoj en paroligaj ekzercoj? Ili ja abundas je perkoloraj aŭ perfiguraj aludoj pri la estinteco kaj revoj de la koncerna popolo, pri la aspekto de la landa naturo. Tia riĉa temaro certe instigas al krea diskutado.

Jen kelkaj pliaj sugestoj. (Antaŭajn vd. JA 98/1, p. 10.)

Pri kio aludas koloroj sur flagoj?

Estas relative facile konkretigi la signifon de unuopaj koloroj, tamen necesas konsideri la politikajn aŭ geografiajn specifajojn de la koncerna lando.

La **verda koloro** povas atentigi pri arbaroj, fekundeco de la patrolanda tero, naturriĉaĵoj, naturo ĝenerale, agrikulturo, paco, libero, feliĉo ...



La **ruĝa koloro** povas simboli la sunon, flamengojn, la batalon de la popolo, la verŝitan sangon, progreson, revolucion, bravecon kaj kuraĝon, batalon por sendependeco, unuecon kaj patriotismon ...



La **flava koloro (oro)** aludas pri sabloriĉaj plaĝoj, suno, tritikokampoj, dezerto, savano, mineralaj riĉaĵoj, amon al la patrujo ...

La **blanka koloro (arĝento)** indikas neĝon, la blankrasan parton de la loĝantaro, moralan purecon, unuecon, pacamon, prudenton, justecon, esperon pri hela estonteco, virton aŭ interpacigon inter diversaj etnaj grupoj ...

Kiel redoni bazajn heraldikajn kolorojn, se mankas koloroj?

Simple per strekoj, linioj kaj punktoj.

Simbolo de la blua koloro: ,
tiu de la verda: .

Ruĝan simbolas: , flavan, oran oni ilustras per: .

por la blanka, arĝenta sufiĉas la blanka papero sen ia ajn signo.

Ekzercoj

Kaj nun igu viajn lernantojn "deĉifri" flagojn laŭ iliaj koloroj (eble laŭ certaj geografiaj sugestoj via-flanke). Petu viajn kursanojn solvi la enigmon sur p. 24.

Fine, vi havas eblecon atentigi pri oficialaj devizoj, kiuj troviĝas sur multaj ŝtataj blazonoj. Eble tio vekas intereson en kelkaj lernantoj al la latina lingvo. Ekzemploj:

E PLURIBUS UNUM (Usono), SUB UMBRA FLOREO (Belizio).

TIII DAHLENBURG, Germanio

AMSTERDAMO



MOSKVO



PRAGO



BERLINO



BRUSELO



PARIZO



AFORISMOJ¹

el la kolekt'ajo de Svetlana Uspahoĝajeva

- *Aforismo estas novelo², el kiu redaktoro³ for-strekis ĉion super-fluan.*
- *Se vi ne povas eviti mal-sanojn, evitu almenaŭ doktorojn⁴.*
- *Homoj ofte uzas sian saĝon por fari mal-saĝ'ajojn.*
- *Silent'ema malsaĝ'ulo estas jam saĝa homo.*
- *Kiom ajn da mono ni havas, ĝi ĉiam mankas, kaj kiom ajn da saĝo ni havas, ĝi ĉiam sufiĉas.*
- *Geni'uloj⁵, certe, estas sen-mortaj, sed malsaĝuloj vivas pli longe.*
- *Por fari homon feliĉa, necesas, antaŭe, for-preni ĉion kaj, poste, doni mal-multe.*

Ĉi tiuj ĉarmaj aforismoj sen-escepte⁶ estas pren'itaj el **KOMENCANTO**, revuo – kiel la titolo montras – por tiuj kiuj ĵus komencis lerni Esperanton aŭ kiuj komencas verki en Esperanto. Ĝi aperas 8-foje jare. Redaktas⁷ kaj el-donas: **Viktor KUDRJAVCEV, RU-620041 Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio**. Jar'abono: 24 NLG / 12 USD aŭ 10 USD (orient'eŭropa kaj latin'amerika tarifo), 32 rubloj⁸ (por Rusio). **Helpu lian laboron per abono.**

1. konciza frap'frazo / 2. rakonto pri io aŭ iu / 3. homo kiu verkas gazeton / 4. ĉi tie: kurac'istojn / 5. homoj kun el-stare brila kapablo / 6. sen-manke ĉiuj / 7. faras gazeton / 8. mono de rusoj.

FINO DE “BILLY LA BORANTO” (paĝo 22)

Minimumaj postuloj: IBM PC kun DOS, Windows aŭ OS/2; 486DX2/66 Mhz, 8 MB da RAM, 6 MB da diskospaco, KD-ROM leg'ilo, 800 · 600 SVGA grafika karto, son'karto. La ludo mem estas DOS-baz'ita kaj plej glate ek-funkcias, se ĝi estas vok'ata el DOS aŭ DOS-fenestro.

Laŭ ekskluziva kun-laboro inter la dana el-don'isto kaj ILEI, ni distribuas la demo-diskon **sen-page** al tiuj leg'antoj de *Juna Amiko* ĉe kiuj la afrankaj limoj permesas tion. Eĉ se vi ne havas sufiĉe potencon aŭ ekip'itan komputilon, ni fidas ke multaj legantoj povos ie al-iri taŭgan. La dosiero “Legumin” donas klar'igojn pri instal'ado. La demo-disko havas kelkajn tekstojn (i.a. de ILEI), dosierojn por permesi al vi skribi en Windows per Esperantaj literoj (donaco de *Eventoj*) kaj kantojn al-done al la ludo mem.

Se vi ne ricevis demo-diskon kun la revuo kaj deziras tion, vizitu la hejm'paĝon de Billy: <http://ttt.esperanto.dk/billy/> kie vi povas provi la ludon sen-page, aŭ petu de *Juna Amiko* (pf.193, H-1368 Budapest) apartan sendon. Tiu-kaze, se estas eble, bv. al-doni 5 irpk aŭ 5 DEM aŭ 2 USD por kovri la ekspedajn kostojn.

Grava informo: la demo-diskoj ĝis nun ne al-venis. Tre povos, do, esti ke ni sendos ĝin nur kun la decembra numero (98/4). Pardonu!

BILLY LA BORANTO

Jen *aventur'ema* knab'eto, kiu diligente kuras tien-reen, supren, suben, saltas, falas aŭ lifte lev'iĝas sur via komputila ekrano. Sed li ne havas propran vivon, *lin regas kaj direktas vi*. Komence, jen li trovas sin en *ĝangalo*, inter fruktoj, vag'antaj monstr'etoj kaj fal'antaj trezor'kest'egoj. Vi sendos la kuraĝan knabeton laŭ la vojoj – Billy devas eviti la monstrojn, kolekti la fruktojn kaj profiti la trezor'ajojn. Jen la plej nova komputila ludo, lanĉ'ita en du-deko da lingvoj, nun kun sono kaj tekstoj ankaŭ en *Esperanto*. Ĝi havas du versiojn: *demonstran kaj plenan*.

Iom da detaloj:

- *Ne-perforta, infan-amika ludo; du niveloj da facil'eco, tiel ke infanoj ek-de 5-jaraj povas sukcesi, tamen ankaŭ la pli lertaj devas lukti.*
- *Sur kompakta disko (KD-ROM), kun alt'kvalitaj 16-bitaj son'efektoj kaj variaj, amuzaj, kelk'foje eĉ proverb'ecaj el-diroj de Billy.*
- *Detala grafiko (800 · 600 punktoj) por altkvalitaj scenoj kaj figuroj.*
- *Reg'ebla per klav'aro aŭ ĝojstango.*
- *Helpo-tekstoj kaj el-montra programo en Esperanto.*
- *Pli ol 150 malsamaj ekranoj en kvin fantazi'mondo.* (La demonstra disko prezentas nur la unuan, ĝangalan mondon.)
- *Amaso da kaŝ'itaj frand'ajoj kaj specialaj objektoj, kiuj dum-tempe donas al Billy magiajn aŭ ekstrajn povojn.*

FINO sur paĝo 21

juna amiko

Internacia Esperanto-Revujo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

25-a jaro, n-ro 3 (86), 1998

Aperas 4 fojojn jare.

Redaktoro: Géza Kurucz (Hitel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)

Ret'adreso: junaamiko@esperanto.nu

Abona adreso: Juna amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby, Svedio


Lingva revizianto: André Albault (Francio)

Kunlaborantoj: *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *Lisbet kaj Bertil Andreasson* (Svedio), *Stefan MacGill* (Hungario), *s-ino Raita Pyhälä* (Finnlando), *s-ino Monique Noël* (Francio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Gennadij Basov* (Rusio), *Brandhyl Mezini* (Albanio), *Till Dahlenburg* (Germanio), *Bill Mak* (Ĉinio), *Rinzo Okumura* (Japanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *M.G.Kamali* (Irano), *Zoltán Kurucz* (Hungario); *Dieter Berndt* (Germanio); grafikistoj: *Melinda Sántha, Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio)

Farita en Presejo Saluton

Fényes Adolf u. 19-21, H-1036 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1314



KION ONI OPINIAS PRI LA LUDO?

- "amuza, defia, bonegaj grafikaĵoj, tre altkvalita kompare kun aliaj simil'specaj ludoj." (*TEJO Tutmonde*)
- "tre rimark'inda" (*Esperanto en Danio*)
- "post du semajnoj da intensa lud'ado, mi povas nur rekomendi ĝin al aliaj (ankaŭ neesperantistoj)" (*Koncize*)

La plenan version de la ludo vendas UEA kaj FEL je ĉ. 40-50 DEM



Jen ok naclaj flagoj.
Nur unu el ili havas la
ĝustan super-skribon.
Kiu? La ceterajn ĝust-
igu! Poste desegnu
tiujn, kies lando-nomon
vi vidas, sed la flagon
ne. La solvojn sendu al
la adreso de la
redaktoro (paĝo 22) ĝis
la 1-a de septembro.

